



katolika **7** ***sento*** **4**

anno 53°
u.e.c.i.





KATOLIKA SENTO

**BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)**

Anno 53° - 1974

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

**Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:**
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

**Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:**
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

**Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964**

KATOLIKA SENTO

n^o 5

53a Jaro

Majo 1974

EL LA APOSTOLA ADMONO DE LA SANKTA PATRO PRI LA KRESKINTAJ BEZONOJ DE LA EKLEZIO EN LA SANKTA LANDO

Honorindaj Fratoj, karaj Filoj,
sanon kaj apostolan benon.

Ni intencas turniĝi al vi, karegaj fratoj kaj fi
loj, por proponi al via konsidero la devon sentigi,
niaflanke, al la kristanaj komunumoj de la Sankta
Lando la signifon de la eklezia karitato, kiu kunli-
gas nin ĉiujn.

Fakte, la Eklezio de Jerusalemo okupas spe-
cialan lokon en la zorgemo de la Sankta Sidejo kaj
en la maltrankvilo de la tuta kristana mondo, dum
la interesiĝo pri la Sanktaj Lokoj kaj precipe pri
la urbo Jerusalemo elstaras ankaŭ en la plej altaj a
sembleoj de la Nacioj kaj en la plej grandaj interna-
ciaj Organizoj, por protekti ĝian sendanĝerecon kaj
garantii la liberan praktikadon de la religio kaj de
la kulto.

Tia prizorgado estas nuntempe pli postulata
pro la gravaj problemoj je ordo religia, politika kaj
socia tie ekzistantaj: ili estas la problemoj komplek-
saj kaj delikataj pri la kunekzistado de la lokaj po-
poloj, pri ilia paca vivado, kaj la demandoj je ka-
raktero religia, civila kaj humana, koncernantaj la

vivon de la diversaj komunumoj loĝantaj en la Sankta Lando.

Ni memoras, kun animo ankoraŭ ĉagrenita, kvankam prilumata per radio de espero, tion, kion Ni lastatempe asertis, nome ke la pludaŭro de la streĉostato en Meza Oriento, sen plenumo de konkludaj paŝoj al la paco, konsistigas gravan kaj konstantan danĝeron, kiu minacas ne nur la trankvilon kaj la sekurecon de tiuj popoloj - kaj la pacon de la tuta mondo - sed ankaŭ iujn valorojn tre karajn, pro diversaj motivoj, al granda parto de la homaro. Por ne diri, ke la pliiĝanta firmiĝo de situacioj sen klara jura fundamento, internacie agnoskita kaj garantiita, povos nur malfaciligi, poste, anstataŭ faciligi, justan kaj akcepteblan akordigon, kiu prikonsideru ĉi es rajtojn: ni pensas, tute speciale, pri Jerusalemo, Sankta Urbo, kaj Ĉefurbo de Monoteismo, al kiuplej intense en ĉi tiuj tagoj kuras la penso de la adeptoj de Kristo, kaj en kiu ili, egale kiel la hebreoj kaj la muzulmanoj, devas sin senti plene "civitanoj".

Niaflanke, Ni ne povas ne rememorigi la pilgrimadon, kiu Ni faris, en januaro 1964a, al la Lando de Jesuo. Ni volis iri tien por persone honori, en la Sanktaj Lokoj, kie Kristo naskiĝis, mortis kaj, reviviĝinte, supreniris al la Ĉielo, la misterojn de Nia savo. Kaj Ni ne povas forgesi la renkontiĝon kun tiuj kristanaj religiaj Estroj, inter kiuj la greka Patriarko kaj la armena Patriarko de Jerusalemo, kaj kun la amaso de la kredantoj, kiuj ĉirkaŭis Nin kvaŭzaŭ en forta brakumo de kredo kaj de karitato.

Parolante pri tio al la Konciliaj Patroj, Ni indikis ankaŭ ĝian celon: estis necese "intensigi preĝojn kaj agojn", por ke la Koncilio bone fermiĝu. Tial Ni decidis fariĝi Ni mem pilgrimantoj al la Lando de Jesuo Nia Sinjoro", "lando, kie iam vivis niaj Prapatroj en la Kredo; lando, kie resonis la voĉo

de la Profetoj, kiuj parolis en la nomo de Dio, de Abrahamo, de Isaako kaj de Jakobo; lando, fine, kaj precipe, kiun la ĉeesto de Kristo igis jam benita kaj sankta por la kristanoj kaj, oni povas diri, por la tuta homaro". "Neniu povas forgesi, ke, kiam Dio volis elekti, kiel homo, patrujon, lingvon, familion en ĉi tiu mondo, li prenis ilin el Oriento".

Tiu benita lando tial fariĝis, iel, la spirita havaĵo de la tutmondaj kristanoj, kiuj deziregas povi ĝin viziti, en pia pilgrimado, almenaŭ unu fojon en la vivo, por kontentigi sian devotecon kaj esprimi sian amon al Dio fariĝinta Infano en Betlehemo, al la dia junulo kaj laboristo en Nazareto, al la dia Majstro kaj Miraklisto tra la tuta regiono, al la dia Krucumito sur Kalvario, al la Redemptoro reviviĝinta el la tombo, kiu troviĝas en la "Templo de la Reviviĝo".

Sed tiu estas ankaŭ la lando, en kiu, apud la Sanktejoj kaj la Sanktaj Lokoj, ekzistas kaj agadas vivanta Eklezio, Komunumo de Kredantoj je Kristo. Komunumo, kiu en la sinsekvo de la historio, suferis dolorajn travivaĵojn: internaj dividoj, persekutoj el ekstere kaj, antaŭ kelka tempo, elmigrado igis ĝin malforta, ne plu memsufiĉa, kaj tial bezonanta nian komprenon kaj nian helpon moralan kaj materialan.

Ĉi tiuj niaj fratoj, "vivantaj, kie vivis Jesuo, kaj kiuj, ĉirkaŭ la Sanktaj Lokoj, estas la posteuloj de la unua tre antikva Eklezio, kiu naskis ĉiujn Ekleziojn", havas valorajn meritojn antaŭ Dio kaj altan spiritan krediton kun ni ĉiuj: ili partoprenas, en speciala kaj ĉiutaga maniero, en la suferoj de Kristo, respondas al sia nomo "kristanoj" per manifestado de kredo vigla, de amo pura kaj

de malriĉeco aŭtentika, laŭ la spirito de la Evangelio. Se ilia ĉeesto malaperus, estingiĝus ĉe la Sanktejoj la varmo de vivanta atesto, kaj la Sanktaj Lokoj kristanaj de Jerusalemo kaj de la Sankta Lando iĝus similaj al muzeoj. Jam Ni havis alian okazon klare montri Nian maltrankvilon pro la malmultiĝo de la kristanoj en la antikvaj regionoj, kiuj estis la lulilo de nia kredo.

Ekde la tago de la Reviviĝo, kiam la plej fidelaj al la dia Majstro iris viziti lian tombon, la unua kerno juda-kristana havis la meriton gardi la memoron pri la plej gravaj Sanktaj Lokoj, kaj indiki iliajn restaĵojn al la pilgrimantoj, kiuj baldaŭ komencis ilin vizitadi.

Estas vere, ke la Kristanismo estas religio universal^ua, ligita al neniu Lando, kaj ke ĝiaj sekvan^otoj "adoras la Patron en spirito kaj vero", sed ĝi estas fondita ankaŭ sur revelacio historia. Apud la "historio pri la savo" ekzistas "geografio pri la savo". Tial la Sanktaj Lokoj havas la altan valoron prezenti al la kredo nerefuteblan subtenon, permesante al la kristano rekte kontaktiĝi kun la medio, en kiu "la Vorto fariĝis karno kaj restadis inter ni".

Lastatempaj arkeologiaj elfosadoj, plenumitaj de gravaj kulturaj institutoj - inter kiuj la Biblia Skolo de la Dominikanaj Patroj kaj la "Studium" de la Franciskanaj Patroj de la Gardo - malkovris novajn restaĵojn, kiuj datiĝas de la tempo de Kristo kaj de la Apostoloj.

Ekde la 4a jarc. ekzistas dokumentoj parolantaj pri pilgrimantoj vojaĝantaj al la Sankta Lando, indikante al ili la vojon por faciligi la iradon.

Pli poste, la konata kodekso de Arezzo pri skribas kaj la monumentojn ekzistantajn en la Sankta Lando kaj la ceremoniojn tie celebratajn, precipe

en Jerusalemo dum la Sankta Semajno.

Sankta Hieronimo, kun sia restado en Palestino kaj kun la instigo de li donita al la bibliaj studoj, rimarkinde pliigis la interesiĝon de la okcidenta kristana mondo kaj de la kulturaj klasoj allando de Jesuo: ĝuste tiam estis konstruitaj en Betlehemo du monakejoj kaj unu hospico, evidenta signo de notinda alfluo de pilgrimantoj.

Ankaŭ poste la Sankta Lando daŭre altiris al si, malgraŭ la danĝeroj de la vojaĝo kaj la limigataj kaj malrapidaj komunikiloj, multajn pilgrimantojn: tial multobliĝis, kun la helpo de malavaraj bonfarantoj, monakejoj kaj preĝejoj: en la urboj kaj eĉ en la dezerto ekloĝis monakoj kaj pentofarantoj el ĉiuj nacioj kaj ritoj, kiuj malkovradis en la lando de la Sinjoro la fontojn de la kristana vivo.

Dum la paso de la jarcentoj la alfluron de la pilgrimantoj kondiĉis alternaj historiaj okazaĵoj: ĝi havis momentojn florantajn kaj aliajn malpli bonajn. Ekde la pasinta jarcento ĝi daŭre kreskis, faciligite de la modernaj transportiloj kaj motivite de pli konscia kredo.

Estas reliefinda la fakto, ke dum la Vatikana Koncilio 2a multaj estis la Patroj, kiuj pilgrime iris al la Sanktaj Lokoj. Kaj estas kuraĝige vidi, ke multaj Sacerdotoj kaj Religiuloj amas pasigi kelkajn pormeditajn tagojn en Jerusalemo okaze de la sacerdotiĝo aŭ de specialaj datrevenoj. Ni volus eĉ pliigi tiujn vizitojn kaj restadojn en la Sankta Lando, kaj tiucele ni volis, ke la hospico de "Notre Dame" en Jerusalemo estu remalfermita kaj destinita ankaŭ por akcepti grupojn de Sacerdotoj.

Tiuj pilgrimadoj povis favori renkontiĝon kun popoloj je malsama kredo, ĉar al tiu benita Lando,

kaj precipe al Jerusalemo, rigardas kaj alfluas kiel al sia spirita centro, ne nur la kristanaj komunumoj, inkluzive de tiuj ne katolikaj, sed ankaŭ tiuj hebreaaj kaj muzulmanaj.

Ni arde bondeziras, ke tiuj kontaktoj intensiĝu, kontribuante al la reciproka konatiĝo, al la reciproka respekto, al la proksimiĝo de la fratoj, filoj de la sama Patro, kaj al pli profunda kompreno pri la bezono de paco inter la popoloj.

Jam S.ta Paŭlo varme interesiĝis pri la sorto de la fideluloj en Palestino kaj iniciatis monkollekton por tiuj malriĉaj en Jerusalemo, kaj lian alvokon malavare akceptis la Eklezioj de Macedonio kaj de Aĥajo. La Apostolo mem persone portis la helpon en la Sanktan Urbon, vidante en la monkollekto ligilon inter la novaj komunumoj de la kredantoj kaj la origina Eklezio en Jerusalemo.

La historiaj okazaĵoj de la 13a jarcento portis al la Sankta Lando la Ordenon de la Franciskanoj, kiuj ekde tiam restadis en la lando de Jesuo - dum seninterrompa sinsekvo de jaroj - por servi al la loka Eklezio kaj por gardi, restaŭri, protekti la kristanajn Sanktajn Lokojn. Tamen dum la tempopaso pro la pliiĝo de la bezonoj ilia agado montriĝis nesufiĉa. Tial la Papoj plurfoje intervenis kun patra zorgemo, ordonante monkollekton por la Sanktaj Lokoj.

Ekde la dua duono de la pasinta jarcento rimarkinde pliiĝis la agadoj bonfare al la loka loĝantaro sendistinge, kaj al la ekleziaj komunumoj de la Sankta Lando.

Bedaŭrinde al la loka Eklezio mankas materiaj rimedoj, kaj ĝi suferas pro la gravaj sekvoj de la milito daŭranta, oni povas diri, de jardekoj. Kaj

oni ne povas peti sufiĉan kontribuon de la tieaj fideluloj, ĉar ĝenerale ili havas nur la necesajon por vivi.

Por ke tiu kristana Komunumo, dujarmila en sia origino kaj en sia restado en Palestino, povu pluvivi kaj plifirmigi sian ĉeeston en maniero aktiva ankaŭ je la servo de la aliaj Komunumoj, kun kiuj ĝi devas kunvivi, estas necese, ke la kristanoj de la tuta mondo montriĝu malavaraj, alvenigante al la Eklezio de Jerusalemo la karitaton de siaj preĝoj, la varmon de sia komprenemo kaj la tuŝeblan signon de sia solidareco.

Tial Ni renovigas kaj plivastigas la preskribojn de Niaj Antaŭuloj, kaj speciale tiujn de Leono 13a kaj de Johano 23a, starigante la jenon:

1) En ĉiuj preĝejoj kaj en ĉiuj oratorioj, apartenantaj kaj al la dioceza kaj al la religia klerikaro, unu fojon en la jaro - je la Sankta Vendredo aŭ je alia tago fiksita de la loka Episkopo - kune kun la apartaj preĝoj por niaj fratoj de la Eklezio de la Sankta Lando oni faru monkoklekton same al ili destinitan. La fideluloj estu sciigitaj kun taŭga anticipo, ke tiu monkoklekto estos oferita por la gardado ne nur de la Sanktaj Lokoj, sed antaŭ ĉio de la institucioj porpastraj, helpaj, edukaj kaj sociaj, kiujn la Eklezio subtenas en la Sankta Lando favore al iliaj kristanaj fratoj kaj al la loka loĝantaro.

2) La monkoferoj estu ĝustatempe transdonitaj fare de la Parokestroj kaj de la Rektoroj de la preĝejoj kaj oratorioj al ilia Episkopo, kiu transdonos ilin al la plej proksima Komisaro de la Sankta Lando, kies aktiveco, tiom bonmerita en la pasinteco, ŝajnas al ni ankoraŭ valida kaj funkciiva, aŭ tra alia taŭga peranto.

3) La Sankta Kongregacio por la Orientaj Eklezioj zorgos, laŭ la instrukcioj de Ni donitaj, certigi, ke la Gardantaro de la Sankta Lando kaj la loka Hierarkio, en la respekto de la respektivaj taskoj, po-

vu daŭrigi siajn instituciojn, firmigi kaj evoluigi ilin, en plena harmonio kaj en strikta kunlaborado kun la aliaj Organizoj havantaj specialajn ligojn kun la Sankta Lando kaj zorgeme interesigantaj pri la sorto de tiu lo ka Eklezio.

Kune kun la Gardantaro de la Sankta Lando, fakte, ekzistas aliaj institucioj meritantaj apogon kaj helpon, inter kiuj estas menciinda la Pontifika Misio.

Adresante ĉi tiun alvokon, Ni esperas, ke la fideluloj de la tuta mondo, pliigante siajn monoferojn favore al la Kolekto tradicie nomata de la Sanktaj Loko, ne volos manki siajn kontribuojn kaj sian koran apogon al ĉiuj institucioj de la Eklezio en la lando de la Sinjoro, por ke daŭru viva la atesto de la Evangelio kaj pli solida fariĝu ĉirkaŭ la Sanktejoj la ĉeesto de la sekvantoj de Kristo.

Al ĉiuj tiuj Organizoj alvenu, en ĉi tiu okazo, Nia viva gratulo kaj kuraĝigo.

Fine ni esprimas nian laŭdon kaj nian apogon al ĉiuj prizorgaj institutoj kaj al ĉiuj bonvolaj homoj, kiuj kontribuas por mildigi la gravajn suferojn de tiuj popoloj, super kiuj ankoraŭ ŝvebas la timo pri estonteco necerta kaj peniga. Dio volu, ke ilia bonfara agado, kun la reakirita paco, kiel ni ĉiuj bondeziras, pretigu tagojn pli bonajn al la loĝantoj de la Sankta Lando.

El Romo, apud Sankta Petro, la 25an de marto 1974a.

trad. C. M.-P.M.

ROMA ESPIRANTA VOĈO

n°128

EL NEKROLOGO DE ĴURNALOJ ni ricevis la malĝojan sciigon de la morto, je la respektinda aĝo de 93 jaroj, de p. Johano Bonardi, okazinta en Parma je la 1-a de majo.

La kara patro, kiu dum preskaŭ 40 jaroj plenumis en Romo la taskon de reprezentanto de sia Kongregacio (Instituto Sankta Francisko Ksavero por la Eksterlandaj Misioj) antaŭ la Sankta Seĝo, preskaŭ ĝis la fino de sia vivo, estis multe interesita al nia katolika esperanta movado. En la 1961a li priksribis por nia bulteno, kiel li konatiĝis kun Esperanto. Ĉar lia sperto ŝajnas al ni interesa kaj utila ankaŭ por aliaj, memorige de li, hodiaŭ ni volas denove aperigi tiun leteron.

"En 1908a - li skribis - mi laboradis en urbo Sŭchov, nun Suciang, provinco de Honan, en la centro de Ĉinio. Jam de kvar jaroj mi estis tie, kaj mi parolis en la lingvo mandarena. Estis komisiita al mi promesplena kristanaro kaj mi pretigadis materialojn por konstruo de la preĝejo. Iun tagon mi ricevis leteron el Moskvo, kun adreso: Catholic Mission - Honan - Sŭchow-China. Mi estis surprizita, ĉar mi ne imagis, ke en Moskvo iu povas sin adresi al iu katolika misio en Ĉinio. Mi malfermis la koverton: mallonga, unupaĝa letero. Mi legis, sed mi ne sukcesis kompreni ĝian sencon. Kunigita al la folio troviĝis tre malgranda libreto, kies titolo estis: "Ŝlosilo de la lingvo Esperanto".

Mi aŭdis kelkfoje pri artefarita lingvo Volapŭk kaj ankaŭ Esperanto, sed mi nenian eĉ preskaŭan ideon havis

pri tio. Mi legis do kun intereso la libreton: reguloj pri prononco, substantivoj, prefiksoj kaj verboj, kaj fine ankaŭ vortareto. Post unu horo mi relegis la leteron kaj, kun surprizo, mi komprenis ĉion, kun la helpo, kelkfoje, de la vortareto. Tio estis subita belega revelo. Ankoraŭfoje mi legis la libreton, kaj post unu horo mi opiniis, ke mi estas kapabla respondi. Mia Moskva korespondanto demandis min, ĉu li povas veni en nian urbon por aĉeti kun profito felojn el la loka buĉejo. Mi respondis, ke jam antaŭvenis lin iu sinjoro Aŭreli el Bolonjo, kaj ke pro tio lia eventuala veno ne estus multe profita por li. Kompreneble, en mia letero estiĝis verŝajne eraroj, sed fakte la ruso ne venis.

Ekde tiam mi tre estimis Esperanton, sed ne estis eble al mi lerni pli ol tion, kio estis en la Ŝlosilo.

Nur post la unua mondmilito mi havis la ŝancon renkontiĝi kun la neforgesebla p. M. Carolfi. Li sin deklaris esperantisto, kaj sin diris preta fari kurson pri Esperanto al la studentoj de nia Instituto en Parma, kies rektoro tiam mi estis. Dekkvino da teologiaj studentoj frekventis liajn lecionojn kaj post du jaroj da teoria kaj praktika lernado ili sukcesis paroli flue Esperante. Ĉiuj superis la ekzamenojn kaj kvin aŭ ses inter ili atingis la duagradan diplomon, kiu tiam rajtigis instruadon. Kaj ĉiuj, irinte poste al Ĉinio, formis novajn esperantistojn. Sur la pordo de la Katolika Misio de Chengchow oni metis la Verdan Stelon, kiu alvokis multajn turistojn".

Post la prikscribo de kelkaj okazintaĵoj, en kiuj Esperanto helpis lin dum liaj multaj kaj longaj vojaĝoj - la transiberiaj postulis ne malpli ol dudek tagojn - li konkludis la leteron: "Mi restas ĉiam fervora simpatianto pri Esperanto kaj mi esprimas mian sinceran deziron, ke ĝi, fine, estu proklamata oficiale la lingvo por ĉiuj internaciaj rilatoj. En la 1924a mi partoprenis en la U

niversala Kongreso en Vieno. Parolis reprezentantoj de 47 malsamaj lingvoj, kaj ĉiuj estis perfekte komprenataj. Vera Pentekosto!"

AŬSTRUJO FUNEBRAS pro la forpaso de la Respublika Prezidento Franz Jonas, 74jara, okazinta je la 23a de aprilo; sed ankaŭ la esperantista movado priploras tiun perdon, ĉar li ne nur estis favora al Esperanto pro sia mensa vasteco, sed estis vera esperantisto, kaj iam eĉ gvidanto de kursoj pri la Internacia Lingvo. Ki- am li estis elektita la unuan fojon Prezidento de la Respubliko (23 de majo 1965), estis granda ĝojo en la esperantista kampo, kaj individuoj aŭ esperantaj asocioj sendis al li gratulojn kaj bondezirojn. Ni memoras kun fiereco la akcepton, kiun la romaj esperantistoj faris al li, okaze de lia oficiala vizito al Romo, aklamante lin per la Internacia Lingvo flanke de densa esperantista grupo ĉe la Koloseo je la 16a de novembro 1971a akcepto, kiun li grandanime reciprokis la postan tagon en salono de "Grand Hotel". Li aŭskultis ankaŭ soneton por okaze verkitan de nia karmemora Luigi Minnaja kaj respondis kun evidenta plezuro al la omaĝoj en la esperanta lingvo al li tiom kara (v. nian raporton en K.S., dec. 1971a).

ALIĜIS AL U.E.C.I. kaj al Katolika Sento (5a listo):

Brescia: E. Bordogna; C. Dusina; B. Marinaro; Genovo: F. Bianchi; Mirandola (MO): Esp. Grupo; Pistoia: U. Stoppoloni; Rieti: I. Pirrotti; Remo: R. Corsetti; R. Clerici; A. Maier; C. Cimino; Torino: F. Pennacchietti; Treviso: Semin. Vescov.; Venecio: G. Rosada; Aŭstrujo: J. Nagy; Belgujo: E. Paesmans; Germanujo: E. Stox; Hungarujo: A. Csepella; Nederlando: S. P. Smits; Pollando: E. Wasilewski.

Entute: 300.

LA VATIKANA POŜTO eldonis je la 23a de aprilo novan serion da poŝtmarkoj, dediĉitaj al la Biblio.

Laŭ la sugestoj de UNESCO, kiu proklamis en 1972a la Internacian Jaron por la Libro, ĉirkaŭ 100 ŝtatoj - en la tuta mondo - propagandis ĉi tiun iniciaton per memorigaj serioj da poŝtmarkoj. Kaj ankaŭ la Vatikana Ŝtato eldonis iam unuan serion de 5 poŝtmarkoj rilatantaj miniaturojn de antikvaj bibliaj kodeksoj.

Sed la dua menciita nova eldono diferencas de la unua pro la fakto, ke la dua estas ilustrita el verkoj de ge-
knaboj. La 15-lira poŝtmarko ilustras la temon: "Kaj estiĝis la lumo!" Desegnita de Patricia Ghioni, 16jara el Cinisiello Balsamo, ĉe Milano. Tiu de 25 liroj havas temon: "Ne ~~konfidu~~ sin al Dio". Ĝi estas verko de Carlo la Manadili, 12jara, el Bejruto: ŝia ilustraĵo estis taksita kiel la plej bona el 45.000 prezentitaj de junaj gestudentoj de Libano. La valoro de 50 liroj prezentas la Anunciacion: linoleuma gravuraĵo, farita de la japana Asami Tsuboj, 12jara. La p.m. de 90 liroj montras multkoloran gluadon, figurantan Kristnaskon; ĝi estas verko de Thsala Ntobu, 20jara, el Zairio; kaj, fine, tiu de 180 liroj ilustras la temon: "La Sinjoro malsatigas sian popolon", per manoj, kiuj kolektas grenerojn kaj spikojn: bela desegnaĵo de Ros Mary Veizaga, 15jara, el Bolivio.

La interesa serio aperis kune kun alia, memorige de la Unuiĝo de la Universala Poŝto (U.P.U.): du belaj, grandaj poŝtmarkoj, prezentantaj, la 50-lira, la Arkeon de Noa, navigantan sur tempesta maro, dum en la ĉielo aperas ĉielarko kaj kolombo alvenas kun olivbranĉeto; la 90-lira figuras ŝafon, kiu trinkas ĉe akvoflua monto, sur kies pinto oni vidas la Leĝtabelojn. Ambaŭ eltiritaj el sugestiaj mozaikaj verkoj.

NI RICEVIS 41-PAGAN broŝuron, titolitan: "La kores

pondado de Jezuo". Traduko de Josef Eder, (Graz) el dokumento revelaciita, laŭ la tradukisto, al la "skribisto de Dio": Jakobo Lorber.

Verdire temas pri pia legendo, jam de multaj jarcentoj konata ĉe Orientaj Eklezioj, laŭ tekstoj en la siria, armena, greka, rumana kaj bulgara lingvoj, pri kiu ekzistas ankaŭ bibliografio. Abgar estis nomo de pluraj reĝoj de urbo Edeso en la norda Sirio, kiuj regadis kelkajn jarcentojn antaŭ kaj post Jesuo Kristo. Inter ĉi tiuj Abgar 9a (179- 216 p.K.) transpasis el paganismo al kristanismo.

La dirita legendo rilatas reĝon Abgar 5a, la Negra, kiu regadis de la 4a a.K. ĝis la 7a p.K. Laŭ tiu legendo Abgar skribis leteron al Jesuo Kristo, portitan al li en Jerusalemo per kuriero, petante, ke Jesuo iru al Edeso, por liberigi lin de grava malsano. Jesuo respondis al li, ke lia misio rilatis nur Judeon, sed ke post sia morto kaj ĉieliro li sendos disĉiplon al li. Fakte unu el liaj disĉiploj, Tadeo, iros poste al Edeso, resanigos la reĝon kaj tie disvastigos la evangelion.

Temas pri unu el tiuj piaj rakontoj, kiuj floradis kiam la evangeliaj tekstoj estis konfeditaj al malmultaj lokoj kaj personoj; rakontoj, kiuj konsistigis la longan serion de la tiel diritaj apokrifaĵoj (v. Biblian Revuon 1-1973, n°n 283an).

El la Katolika Eklezio

PAŬLO 6a, DUM LA KUTIMA DIMANĈA renkontiĝo kun la fideluloj por la tagmeza alvoko al Maria, kaj por la sekvanta apostola beno, petis de ĉiuj insiste preĝialla Madono. El la fenestro de sia privata studejo, la papo, prenante inspiron de la kuranta

maja monato, dediĉita al Maria, memorigis sian ĵusan apostolan leteron "por la ĝusta ordo kaj disvolvo de la kulto al la beata Virgulino Maria", pere de kio - li diris - ni klopodis realvoki tiun devotecon al la bibliaj kaj teologiaj fundamentoj kaj al la liturgiaj normoj, oficialaj por la tuta eklezio, ĉar - li aldonis - estas necese havi verajn kaj klarajn ideojn, aŭtentikajn kaj noblajn esprimojn pri ĉi tiu parto tiel grava de nia religia vivo, entute centrita, kiel sciante, en la mistero de Kristo".

Substrekinte la fidon, kiun oni devas meti en la patrinan propeton de la Madono, Paŭlo 6a invitis la ĉeestantojn peti ŝian aman intervenon por la problemoj, kiuj hodiaŭ montriĝas pli urĝaj en multaj mondpartoj. "Ekzemple - klarigis la Papo - por la Sanktaj Lokoj, de ni ĉiuj tiom amataj, kaj por la tuta Mezoriento, kie ni esperas, ke dum ĉi tiuj tagoj estingiĝos la gravaj kaj kompleksaj konfliktoj; poste ni alvokos la Madonon, kiu en Lurdo havas privilegitan sanktejon, por la nunaj elektadoj en Francujo; ni alvokos la Madonon de Fatimo por la solvo de la ĵus malfermitaj problemoj en Portugalujo; la Madonon honoratan en Sankta Maria la Granda, en la sanktejoj de Oropo, Loreto kaj Pompejo por la religia paco en Italujo; la Madonon de Ĉestokovo por la katolika Pollando, kiu dum ĉi tiuj tagoj ŝin honoras per imponaj sclenoj; la Madonon alvokatan en Gvadelupo, aŭ "Aparecida" aŭ en Vaŝingtono por la bonfarto de tiuj landoj, kiuj gloras pro ĉi tiuj siaj sanktejoj, kaj poste por ĉiuj landoj, kiuj en siaj temploj dediĉitaj al la Virgulino, alvokas ŝian protekton, sekvas ŝiajn ekzemplojn, proklamas sian filan fidon al ŝi kaj montras tiujn aspektojn, kiuj donas al la kulto por Maria senkomparan motivon por la defendo de la nia tempa virino, en ŝia netuŝebla digno, kaj en ŝia mo

derna spirita kaj socia vokiĝo".

OKAZE DE LA SEPA jarcenta datreveno de la morto de S. Tomaso de Akvino, okazis pluraj manifestadoj honore al tiu sankta eklezia doktoro, unu el la plej grandaj en la historio.

Inter la multaj altnivelaj memorigadoj, la plej grava estis la Internacia Kongreso, dediĉita al la "Anĝela Doktoro" en la universitato, "Angelicum", kun pli ol 1500 kongresanoj. La Papo mem partoprenis en ĝi je la 20a de aprilo vespere kaj en la granda aŭlo de la universitato, plenplena de religiaj aŭtoritatoj kaj de la plej altaj reprezentantoj de la eklezia kulturo, li alparolis la ĉeestantojn, proklamante la aktualecon de la doktrino de la Akvina Doktoro. La postan tagon dum la "Regina coeli" (la paska Anĝelus) li memorigis la eventon antaŭ la fidelularo kunveninta en la S. Petro - placo :

"Hieraŭ posttagmeze - li diris - ni estis en la "Angelicum" (elp. Anĝelikum), la dominikana Universitato, kie dum ĉi tiuj tagoj kunvenis multnombra internacia kongreso de kleruloj, okaze de la sepa jarcento de la morto de la Akvina S. Tomaso, granda sanktulo, filozofo kaj teologo, unu el la plej gravaj figuroj en la historio de la mezepoka kaj eŭropa kulturo, mondfama persono, aktuala, moderna.

Ni ankaŭ volis honori, almenaŭ per nia ĉeesto, ĉi tiun menseminentulon, al kiu tiom ŝuldas la kulturo, la civilizo, la Eklezio; kaj tion ni faris kun arda kordeziro: ke la novaj generacioj, la junuloj, studentoj, kleruloj, majstroj, politikistoj, ĵurnalistoj, unuvorte, tiuj, kiuj estas laboristoj de la menso kaj de la vorto, trovu en ĉi tiu saĝa doktoro la "bonan pensarton" laŭ esprimo de Paskalo ,



sin ekzercante en la dia (figure dia) fakulto de inteligento pere de organika kaj racia priserĉo kaj konkero de la Vero, ĝis ĝiaj superaj radiadoj, trans la sensa kaj sperteca zono, nuntempe tiom alloga; en la sfero ne nur matematika kaj scienca, kie hodiaŭ la racio triumfas, sed ankaŭ en tiu de la plej superaj principoj, kiuj igas la problemon de la esto, do ankaŭ de Dio, kaj sekve de nia vivo, nesupereblē interesa.

Sankta Tomaso, per sia aristotela, tio estas realisma emo, kapablas konduki nin tra ĉi tiuj vojoj, ne malagnoskante la verojn entenatajn en ĉiu ajn filozofia sistemo kaj ne malpermesante al la homa esploro ĉian daŭran progreson; kaj alvenante al la sojlo de la dia revelacio, anstataŭ ĝin rifuzi, li klopodas ĝin akcepti al siaj raciaj kaj superraciaj sferoj, nome religiaj kaj mistikaj, kun duobla severa respekto: al homo, disĉiplo, kaj al la Vorto de Dio, majstro de pluaj savaj veroj.

Ni pensis al alia Tomaso, al tiu de la evangelio, Didimo, laŭ kelkaj aspektoj simila al Majstro Tomaso, pozitiva rezonanto, kiel tiom da modernuloj: "se mi ne vidas, mi ne kredas"; sed tiuj, antaŭ la palpebla renkontiĝo kun Kristo, rezignas pri sia obstino kaj ekkrias: "Mia Sinjoro kaj mia Dio", preskaŭ preludo de la mirinda liturgio de la "Korpo de Kristo", verkita de Sankta Tomaso de Akvino por Orvieto".

Ankaŭ la itala prezidento Leone, aŭdience akceptante p. Aniceton Fernandez, Ĝeneralan Majstron de la Predikista Ordeno, kun delegacio de partoprenantoj al la Kongreso, adresis al la ĉeestantaro tre noblan paroladon pri Sankta Tomaso kaj lia doktrino, emfazante lian grandecon por la Eklezio kaj Italujo.

La Kongreso konkludiĝis en Napolo, kie la sanktulo ricevis la dominikanan veston, kaj kien post jaroj da instruado en Kolonjo, Parizo kaj aliaj eŭropaj universitataj centroj, li revenis kiel majstro, alvokita de reĝo Karlo d'Anĵuo. Partoprenis kaj oficiale parolis kard. Ursi, ĉefepiskopo de Napolo kaj prof. M.F. Sciacca el Universitato de Ĝenovo; kaj ĉeestis interalie la pola kardinalo Wojtyła, kaj multaj aliaj altaj religiaj aŭtoritatoj kaj eminentuloj de la kulturo.

Inter la multaj iniciatoj por memorige honori Sanktan Tomason, estas interesa tiu de Matthias Lu, kiu publikis rimarkindan liston da verkoj de Aristotelo kaj Sankta Tomaso en la ĉina lingvo kaj kun ĉinaj ideografiaĵoj. La tradukisto estis tiel entuziasma pri ĉi tiu sia laboro, ke li ne nur asertas, ke la riĉeco de la ĉina lingvo kapablas kun rigora ekzakteco traduki la tre precizajn esprimojn de Sankta Tomaso, sed opinias, ke se Aristotelo kaj Sankta Tomaso estus hodiaŭ meze de ni, ili preferus uzi la ĉinan lingvon, tiel belsonan kaj pitoreskan por aldoni pli grandan liberecon, konkretecon kaj viglecon al siaj pensoj!

LA DUA TUTMONDA KONFERENCO pri Paco kaj Religio okazos en la Katolika Universitato de Loveno, en Belgujo, de la 28a de aŭgusto ĝis la 6a de la proksima septembro. Estas atendataj 300 partoprenantoj, reprezentantaj la plej disvastiĝintajn religiojn en la mondo. La lasta konferenco disvolviĝis oktobre de 1970 en Kioto - Japanujo - sub prezidanteco de la ĉefepiskopo de Novdelhio, mons. Anĝelo Fernandes.

Antaŭ 4 jaroj oni diskutis pri la kontribuaĵo, kiun la grandaj religioj povas doni por la solvo de prob

lemoj, kiel progreso, malarmigo, la defendo de la homaj rajtoj. La venonta konferenco enprofundigos ĉe pli ĉi tiujn temojn kaj alfrontos aliajn novajn, kiel ekz. protekto de la natura medio, regionaj konfliktoj, la kvalitoj de la vivo. I

Inter la katolikaj eminentuloj, kiuj apogis ĉi tiun iniciaton, troviĝas la menciita ĉefepiskopo de Novdelhio mons. Fernandes; la ĉefepiskopo de Panamo, mons. Mc.Grath; kaj la ĉefepiskopo de Olinda kaj Recife, en Brazilo, mons. Helder Camara.

FRANCISKA SCHERVIER, nova beatulino de la Eklezio. Iom pli ol monato post la beatigo de Liboro Wagner, (v.K.S. n°4) alia germana figuro estis solene proklamita beata je la 28a de aprilo en la baziliko de Sankta Petro. Tre multaj ŝiaj samnaciuloj alvenis al Romo por ĝui la eksterordinaran celebradon: dum il el la nura urbo Akvisgrano. Fakte ŝi donis al Akvisgrano, kie ŝi naskiĝis, novan gloron per la sankteco, kiun ŝi atingis amante Kriston en la malriĉuloj kaj en la suferantoj.

Dektrijara ŝi perdis sian patrinon, kaj, unu jaron poste, la du pli aĝajn fratinojn. Tiam ekaperis ŝia voĉo por la konsolo de la suferantoj, ĉar forgesante sin mem, ŝi kun respondeca sento sin donis por helpo morala kaj fizika al sia patro kaj al la kvar pli malgrandaj fratetoj. La kampo de ŝia karitato, kiu rilatis ankaŭ malriĉulojn kaj malsanulojn, baldaŭ kreskis: ĉar ŝi akceptis la gvidadon de la paroĥa kuirejo por la popolo. Perdinte ankaŭ la patron, ŝi kunligis al 5 junulinoj, dezirantaj, kiel ŝi, sin dediĉi al la karitato.

Tiel komenciĝis la nova "kongregacio de Franciskaj Fratinoj helpe al malriĉuloj". Ĝi konsistis en du familioj, unu dediĉita al la kontemplo, la alia, ĉefe al

la aktiva vivo. Tiel granda estis la fascino de tiu ekzemplo, ke tuj multaj piaj virinoj aliĝis al ĝi, kaj baldaŭ Franciska devis fondi novajn religiajn domojn en pluraj germanaj urboj kaj ankaŭ en aliaj nacioj kaj en Ameriko, precipe por asisto de elmigrintoj. Dum militoj ŝi troviĝis kun siaj religiaj kunulinoj en la unuaj vicoj de la militantoj, por helpi la vunditojn.

Kvinfoje ŝi estis reelektita kiel ĝenerala patrino de la kongregacio, kiu de Leono 13a je la 19a de septembro 1888 ricevis la definitivan eklezian aprobon. Elĉerpita pro la laboro kaj multaj suferoj eĉ kaŭze de la opozicio de civilaj aŭtoritatoj, kaj pro longa malsano, Franciska Schervier, konata jam kiel "Patrino de la malriĉuloj kaj suferantoj", estis alvokita de Dio je la 14a de decembro 1876 al la meritita premio.

Hodiaŭ la du kongregacioj, la germana kaj la amerika familioj de la filinoj de la Schervier, atingas la nombron de ĉirkaŭ 2000 membroj. La nova beatigo reprezentas hodiaŭ premantan alvokon al la spirito de karitato, ĉar ĝi montras, kela urĝaj problemoj, kiuj suferigas la Eklezion en la tuta mondo, estos solvitaj per la unika rimedo, nome la amo, kiun la sanktuloj donis abunde, ĝin antaŭe ricevinte de la senfina amo de Kristo.

LA SESA JARCENTO de la naskiĝo de la Diservantino Hedviga, reĝino de Pollando, estis solene memorigita en la ĉefdiocezo de Krakovo. La solenoj malfermiĝis per religia rito gvidata de kard. Karlo Wojtyła, ĉefepiskopo de la urbo, kun liaj helpepiskopoj kaj la membroj de la metropolita kanonikaro. Ĉeestis ankaŭ profesoroj kaj lernantoj de la Teologia Fakultato de Krakovo, fondita siatempe de la reĝino Hedviga mem. En la homilio kard. Wojtyła reelvokis la

figuron kaj agadon de la pia reĝino, memorante ĉefe la impulson, kiun ŝi donis al progreso de la kulturo, al karitataj entreprenoj kaj al kreskigo de la kristana kredo. La kardinalo konkludis sian homilion invitante la ĉeestantojn preĝi ne nur por Pollando, sed ankaŭ por ĉiuj eŭropaj popoloj, kaj esprimante aŭspicion, ke la spirito de paco kaj de amo, al kiu sin inspiris reĝino Hedviga, trovi ĉie fekundan grundon.

En alia ceremonio partoprenis junuloj venintaj el ĉiu parto de la lando. Ili kuniĝis ĉe la tombo de la Servantino de Dio, kaj ĉeestis la diservon celebratan de kard. Wojtyła.

La proceso por la beatigo de Reĝino Hedviga, interrompita dum pluraj jarcentoj, estas reprenata, kaj ĝiaj Aktoj estas nun sub la ekzameno de la Sankta Rita Kongregacio.

LA UNUA VOLUMO DE LA NOVA Pola Katolika Enciklopedio, eldonita en Lublino zorge de la Katolika Universitato, aperis fine de februaro. La tuta kolekto antaŭvidas dekkvin volumojn. En la unua kunlaboris preskaŭ kvincent aŭtoroj - ĉiuj polaj - sub gvidado de redakcia Centra Komitato, stariĝinta ĉe la Lublina Katolika Universitato.

La volumo malfermiĝas kun reprodukto de aŭtografo de kard. Wyszyński, kiu projektis la enciklopedion jam en 1946, kiam li estis episkopo de Lublino kaj rektoro de la loka katolika Universitato.

La enkonduko de la ĉefredaktoro, p. Krapiec o.p., precizigas la naturon kaj la celojn de la enciklopedio: ĉi tiu volas "prezenti la doktrinajn problemojn kaj la aktivecon de la katolika Eklezio kaj de aliaj Eklezioj kaj kristanaj kolektivoj, krom kelkajn religiajn kaj kulturajn problemojn de ne-kristanaj religioj".

Kompreneble, ĉar la Enciklopedio estas adresata precipe al poloj, ĝi pritraktas ĉefe kaj amplekse problemojn

historiajn, teologiajn, religiajn, filozofiajn, sciencajn, kulturajn kaj ekleziajn, kiuj interesas la historion de la katolika Eklezio en Pollando. Sub tiu aspekto la Enciklopedio estis multe atendata, ĉar la lasta tiuspeca verko estas de la jaroj 1873 - 1933. El ĉi tiu unua volumo la entrepreno sin prezentas kiel indan monumenton por la jarmilo de la katolika vivo, ĵus celebrita en la pola nacio.

EN VARSOVIO la preĝsemajno por la unuigo de la krista naro, en kiu partoprenis multaj religiaj kolektivoj, estis substrekita per uzo de la internacia lingvo, Esperanto. Tiel montriĝis, ke la problemo de la disiĝo de popoloj kaj de lingvoj povas esti feliĉe solvata en la nomo de Kristo, alvokanta al sia grego la homaron, al kiu ajn lingvo, raso kaj nacio ĝi apartenas.

Esperanto jam de kelkaj jaroj estas kutime uzata en la preĝejo de la Palotanoj, dediĉita al Kristo la Reĝo kaj en la kapelo de la Metodistoj en la sama pola ĉefurbo. En multaj aliaj polaj preĝejoj, ekumenaj celebradoj centriĝis en la figuro de Jesuo Kristo kaj en la repaciga kaj renoviga spirito de la Sankta Jaro.

KARDINALO LEON ETIENNE DUVAL, ĉefepiskopo de Alĝero, en parolado farita okaze de malfermo de la araba seminario de "Caritas", reliefigis, ke en neniu alia kampo la frata dialogo inter kredantoj estas pli efika, necesa kaj komprenata, kiel en tiu de la aganta karitato. "Dialogo inter koroj - diris la kardinalo - signifas interŝanĝonde amikeco; sed vivanta dialogo estas la laboro kune entreprenata por bonfarto de la homaro, por asisto al bezonantoj".

Fakte ĝuste sub la aspekto de la dialogo kun la muzulmana mondo kuniĝis en Alĝero dum la ĵus pasintaj tagoj la "Caritas"-organizoj agantaj en nordafrikaj kaj mezorientaj landoj.

Celo de ĉi tiu renkontiĝo estis ekzameno de la problemoj, en kiuj troviĝas la katolikaj porkaritataj institucioj en landoj grandparte muzulmanaj. Alia motivo de ĉi tiu kunveno estis la preparo de la 10a ĝenerala asembleo de la Internacia "Caritas", kiu okazos en Romo dum la Jubilea Jaro. En la kunsido de Alĝero aparte interesaj montriĝis la raportoj de la delegitoj de "Caritas" apartenantaj al Egiptujo, Jordanio, Jerusalemo kaj Libano, la regionoj, kiuj travivis la ĵusan mezorientan konflikton.

LA ETIOPA POPOLO havas grandan religiantradicion. 60 procentoj de la loĝantaro sekvas la koptan religion; 30 p.c. la muzulmanan; la restantoj konsistas el katolikoj (ĉ. 162.000), protestantoj (ĉ. 100.000), israelidoj, animistoj, ktp.

La kristanismo havas sian originon el la apostolapredikado de sankta Marko, kiu laŭ la tradicio ŝipiris al la Egipta Aleksandrio, de kie la kristanismo transpasis al Nubio kaj Etiopio. Ĉiukaze la kristana religio disvastiĝis en la lando dum la 4a jarcento per la evangelizado de Frumenco kaj Edeso, ambaŭ devenantaj de Sirio.

Gravaj etapoj de la disvastiĝo de kristanismo en Etiopio estas la florado de la Egipta Eklezio en la 13a jarcento, la jezuitaj misioj (1557-1597 kaj 1603-1633), la laboro de la lazaristo beata Justeno de Jakobis (1839-1860), unue Prefekto kaj poste Vikario Apostola, kaj de la kapuceno mons. G. Massaja, Apostola Vikario de Galla (1846-1880), poste kardinalo.

La etiopaj misioj suferis multe dum la dua tutmonda milito, sed tuj post la konflikto oni reprenis la aktivecon pere de diverslandaj misiistoj, kaj en 1961 la Sankta Seĝo starigis la eklezian provincon de Adisabebo kun la samnoma metropolita diocezo kaj kun la dependaj diocezoj de Asmaro kaj Adigrato (tri etiopritaj diocezoj). Ĉi tiuj teritorioj kun la tri Apostolaj Vikariejoj de As-

maro de la Latinoj, Gîmma kaj Harar kaj kun la apostoj la prefekturoj de Awasa kaj Hosanna, konsistigas la ok aktualajn ekleziajn distriktojn en Etiopio.

Laŭ la lasta eklezia statistika Jarlibro, je la 1-a de januaro 1972 la katolika Eklezio en Etiopio havis siajn 162.000 katolikojn (0,6 p.c. de la tuta loĝantaro) dividi tajn inter 110 parokoj kaj 128 preskaŭ-parokoj. Zorgis pri ili 516 sacerdotoj (149 diocezaĵ kaj 367 religiuloj), 113 fratoj kaj 1030 religiulinoj. Krome sin preparis 154 seminarianoj (82 diocezaĵ kaj 72 religiuloj). Laboradis en la lando membroj el pli ol dek ordenoj kaj kongregacioj viraj (Lazaristoj, kapucenoj, kombonanoj, jezuitoj, cistercenoj, Patroj de la Konsolito, Blankaj Patroj, Patroj de la Sankta Spirito, misiistoj de la S. Familio, Fratoj de la Kristanaj Lernejoj, ktp.) kaj membroj de almenaŭ dek ses virinaj kongregacioj.

La servo de la Eklezio en Etiopio rilatas precipe la instruadon, la porsanigan asistigon kaj la socian progreson. En la 1968a la Eklezio direktis lernejajn centrojn kun 32.909 lernantoj. La plej grava entrepreno en tiu ĉi sektoro estas la Asmara Universitato, direktata de la religiulinoj "Piaj Patrinoj de la Negroj", stariginta en 1958, kun tre inda sidejo. Ĝi akiris la oficialan titolon en 1968 kaj tiam ĝi havis 1241 gestudentojn. En la sama jaro la Eklezio gvidadis 88 centrojn pri saniga kaj karitata asisto.

La nombro de la religiaj vokiĝoj estas rimarkinda: 361 entute.

La etiopaj diocezaĵ seminarianoj, kiuj formiĝas en Romo, rezidas interne de la Vatikana Urbo, en unika kolegio, kiu ĝuas tiun privilegion.

.....

.....

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI

Quota di abbonamento L. 1500

Abonkotizo italliroj 1500

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV/70
BOLLETTINO MENSILE